

EL POPOLA ĈINIO

人民中國報

EN TIU ĜI NUMERO:

La Juna Bravulo Liu Sing-ven
Unuigo de la Urbo kaj la
Kamparo

Novĉiniaj Virinoj en Terkulturo

Pli da Fervojoj por Nova Ĉinio

La Antaŭenigantaj Ĉinaj Ler-
nejoj

La Kotonmaŝino

Monata Informa Bulteno Eldonata de Fremdlingva Eldonejo
Redakcio kaj Administracio: 26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio

VOL. II N-RO 12
DEC. 1951

Pliprodukto Kaj Ŝparo, Nia Centra Tasko

En la tria kunsido de la unua Landa Komitato de la Popola Politika Konsiliga Konferenco, Prezidanto Maŭ Ze-tung proponis kaj la kunsido unuanime aprobis la centran taskon "pliiigi produkton kaj praktiki rigidan ŝparon por subteni la ĉinajn popolajn volontulojn." La tutlanda popolo estas energie batalanta por efektiviĝi ĉi tiun taskon.

Por pliiigi nian forton rezisti Usonon kaj helpi Koreion, la tutlanda popolo devas plene subteni la fronton, subteni la ĉinajn popolajn volontulojn kaj garantii provizon al la fronto en la kondiĉo ke la stabileco de varprezoj enlandaj estu konservata kaj la ŝarĝo de la popolo ne estu tropezigata. Por tio ni energie pliiigas produkton kaj praktikas rigidan ŝparon. Tamen, ni tion faras, des pli grave, por akumuli la bezonatan kapitalon por la estonta grandskala landkonstruo. Pliprodukto kaj ŝparo ne estas provizora rimedo por solvi ian malfacilon, sed la baza rimedo por konstrui popolan landon. Por industriigi nian landon ni devas konstante pliiigi kapitalon en grandaj sumoj. Nia popola lando akiras tian kapitalon, ne kiel la imperiismaj landoj, el ekspluatado al la enlanda popolo, rabado al la kolonio aŭ eltordo de kompensajo el venkita lando. Nek devas ni ĝin akiri ĉefe de eksterlanda prunto. Ni ĝin akumulas iom post iom el produktado de agrikulturo kaj ŝtataj entreprenoj kaj la ŝparo en la financa budĝeto. Tial, pliprodukto kaj ŝparo estas la fonto de kapitalo por industriigi nian landon.

En la Nord- oriento

La patriotisma movado de pliprodukto kaj ŝparo de la 790.000 laboristoj kaj funkciuloj de la ŝtataj kaj publikaj entreprenoj en la Nordoriento nun jam eniris la streĉan etapon por plenumi la planon. La movado komencis en la majo sub la alvoko de Kaŭ Kang (高崗), Prezidanto de la Nordorienta Popola Registaro, por krei ekstran riĉaĵon egalan al kvinmilionaj tunoj da greno. La movado disvolvigis en aŭgusto kaj jam kreis por la patrio grandan riĉaĵon. Ĝis la fino de oktobro, laŭ nekompeta statistiko, la suma valoro de la pliprodukta kaj ŝpara plano jam atingis 11,272,000 tunojn da greno. Lasttempo, en la Nordoriento, 48 ŝtataj kaj publikaj fabrikoj kaj minejoj jam plenumis la tutjaran planon de pliprodukto kaj ŝparo.

La pliprodukta kaj ŝpara movado en la Nordoriento ne nur kreis por la patrio grandan kvanton da riĉaĵo, sed ankaŭ ege altigis la politikan konscion kaj laborfervoron de la tuta laboristaro kaj funkciularo. Ekzemple, en sia letero al Prezidanto Kaŭ Kang, la laboristoj kaj funkciuloj de Fuŝuna (撫順) Maŝinfabriko skribis, "Nun je ĉiu frapo de la martelo kaj je ĉiu peco da hejtitaj fero ni ĉiam rememoras nian respondecon al la patrio." Li King-kun (李靜昆), teknikisto en la maŝinfabriko de iu minejo, post peniga studo, reformis la tranŝilon kaj 24-oble altigis la laborefikecon.

En Aliaj Partoj de Ĉinio

Samtempe la movado de pliprodukto kaj ŝparo rapide disvastiĝas al aliaj partoj de Ĉinio. Dudek grandaj industriaj kaj minaj entreprenoj en Pekino kreis ekstran produkton valorantan je 210 miliardaj juanoj (ĉina monunujo) en la unuaj naŭ monatoj de ĉi tiu jaro. Produkto en Liulihua (琉璃河) Cementfabriko en aŭgusto sola egalas al la tuta produkto en kvar kaj duona monatoj sub la japana kaj dek ses kaj duona monatoj sub la Kuomintang-regado. Laboristoj en ĉi tiu fabriko kreis ekstran produkton de 500 miliardaj juanoj por la patrio en tiu unu monato.

Ŝtataj fabrikoj en Tienzin superos sian planitan jaran profiton. Ciferoj el 32 el ĉi tiuj fabrikoj montras ke ili superos siajn planojn je pli ol 750 miliardaj juanoj. Ĉi tiu ekstra enspezo venas de pliiigita produktivo, kun pli bona kvalito de varoj, pli granda produkto kaj malpliigitaj prezoj.

En Tienzina Ŝtalfabriko, la produkto de ŝtalingotoj en la unuaj naŭ monatoj egalas al preskaŭ duoblo de la jarprodukto en 1950. Produktokosto en la tria kvarono de ĉi tiu jaro jam malpliigis je 12 procentoj kompare kun la unua kvarono. Tienzina Fervojburoo jam malpliigis la oftecon de riparo de lokomotivoj per enkonduko de pli bonaj metodoj, tiel ŝparante pli ol 70 milionajn juanojn jare sur ĉiu lokomotivo.

Tangŝana (唐山) Elektrocentro komencis la movadon en novembro. Ĉiu laborejo, ĉiu laborgrupo kaj ĉiu individuo serioze efektiviĝas sian konkursoplanon. "Ni garantias al Prezidanto Maŭ la efektivecon de niaj planoj," diris la laboristoj kaj funkciuloj. "Se nur ni cerbumas kaj serĉas rimedojn, ni certe povas krei ekstran riĉaĵon por la patrio." Kaj tiel la karbokonsumo de la Elektrocentro tagon post tago malaltiĝis ekde la unua de novembro. La meznombra karbokonsumo dum dek ok tagoj estis 0.559 kg. por ĉiu grado de elektro, kiu superis la Sovetian normon de karbokonsumo de 0.56 kg. kaj estis 0.012 kg. pli malalta ol la meznombra karbokonsumo dum dek ok tagoj en oktobro. "Ni daŭre penas kaj lernos teknikon por plue malaltigi karbokonsumon."

Fervore respondante al la konkursa propono de Tangŝana Elektroburoo kaj Tangŝana Elektrocentro, post kontrolo de sia laboro, la Nordokcidenta Elektro-administrejo kaj la Siana Elektrocentro faris planon de la kvara jar-kvarono pliprodukta kaj ŝpara valoron de sepcent tunoj da milio.

La laboristoj kaj funkciuloj de tri elektrocentroj sub la Tajjuana (太原) Elektroburoo decidis pliprodukta kaj ŝpara riĉaĵon valorantan 350.000 kg. da milio, por respondi la konkursoan proponon.

La laboristoj kaj funkciuloj de la tri elektrocentroj sub Ŝekiaĉuanga (石家莊) Elektroburoo skribis al tiuj de Tangŝana Elektroburoo, ke ili pliprodukta kaj ŝpara valoron por la patrio riĉaĵon valorantan ĉirkaŭ 291 tunojn da milio.

La kvin fervojaj administrejoj en Tienzin, Ŝanhajo, Zinan, Ĉengĉou kaj Hengĝang planis pliprodukta kaj ŝpara antaŭ la jarfino 1,110 miliardajn juanojn da riĉaĵo.

La laboristoj kaj funkciuloj de la ŝtataj entreprenoj en Ŝanhajo jam akiris rimarkindan rezulton en plibonigo de administrado kaj pliprodukto kaj ŝparo, kaj faris multajn eltrovojn kaj raciigajn proponojn. En unu jaro ili jam ŝparis por la patrio 30 miliardajn juanojn da riĉaĵo.

Ankaŭ en la vasta kamparo, iom post iom disvastiĝas la movado de pliprodukto kaj ŝparo. Kamparanoj en diversaj lokoj fervore respondas al la alvoko de Prezidanto Maŭ Ze-tung kaj kunvenas por diskuti kiel ĝin efektiviĝi. Ili referas siajn patriotajn kontraktojn aŭ planojn por vintra pliprodukto kaj ŝparo. Per tio ili metas la bazon por la patrio produktita movado en la venonta jaro.

Laŭ ne komplete statistiko, 83 interhelpaj grupoj, 142 kamparanaj labormodeloj kaj multaj aliaj kamparanoj en la provincoj Honan, Anhuĵ, Hunan, Kiangsi, Seĉuan kaj Kirin jam faris siajn planojn de pliprodukto kaj ŝparo aŭ novajn patriotajn kontraktojn.

Nun ili jam komencis sian laboron por efektiviĝi siajn planojn. Ekzemple, la interhelpa grupo de Ĉen Ji-ko (陳錫科) en Kiangsi-provinco jam plenumis sian vintran planon kvin tagojn antaŭ la dato, kaj liberigis homforton por ripari digon, finplugi la rizkamon kaj disvolvi akcesoran produkton. Krome ili aĉetis kvar bovojn per sia ekstra greno. La kamparanoj en Kuangfu-vilaĝo (廣福村), Vuhu (蕪湖), Anhuĵ-provinco jam dufoje plugis per interŝanĝo de homa kaj bruta laboro. Multaj kamparanoj, kiuj ne kutimis al vintra semado, ĉijare ĉiuj semis tritikon kaj kolzon. Ankaŭ ĉiuj armeaj familioj ĝustatempe semis vintrajn kreskaĵojn.

Ĉio ĉi ja estas nur la komenco, kaj precipe en la kampo de ŝtataj entreprenoj. Kaj nun en la Nordoriento, en Nordĉinio, en Orienta Ĉinio, en la Nordokcidento, en Centra-Suda Ĉinio kaj en la Sudokcidento, ĉie estas farataj planoj por la venonta jaro. La movado farigas landskala kaj ĉiufanka. En ŝtataj entreprenoj, ni praktikas budĝetan kontrolon. En agrikulturo, ni altigas la produktokvanton po areo-unuo. Ni disvastiĝas la spertojn de labormodeloj Li Ŝun-ta (李順達), Kju Jaŭ-li (曲耀離). Per tio ni kreas grandan riĉaĵon por la patrio. En diversrangaj popolaj registaroj, en trupoj de la Popola Liberiga Armeo, en organizoj de la popolo kaj la Ĉina Komunista-Partio kaj aliaj demokratiaj partioj ni daŭre disvolvas nian gloran tradicion de diligenteo, ŝparemo kaj sistemo malgraŭ malfacilo, kaj batalas kontraŭ ĉia ago de luksemo, malŝparemo kaj korupto. En kulturaj kaj edukaj laboroj, ni penas ekonomie utiligi homforton kaj materian ekipon por pli granda efiko. Ankaŭ en privata industrio kaj komerco kaj la tuta socio, ni kuraĝigas ŝparon de necesa elspezo por pliiigi kapitalon en produkto.

Por disvolvi amasan movadon de pliprodukto kaj ŝparo, ni unuflanke disvolvas kritikon kaj memkritikon kontraŭ ia ajn malŝparo, senefikeco aŭ korupto, kaj aliflanke disvastiĝas spertojn de antaŭirantoj en pliprodukto kaj ŝparo tra la tuta lando. Komprenoble, por krei ekstran riĉaĵon, ni ne povas unuflanke pliprodukta kaj aliflanke malŝpari. Tio estus senfukta klopodo. Kaj por pliprodukta, ni ne dependas de ekstra aŭ pli intensa laboro, sed de kreo, inventoj kaj raciigo de labororganizo. Tio ja estas la sperto de la laboristoj en la Nordoriento kaj la kamparanaj labormodeloj Li Ŝun-ta kaj Kju Jaŭ-li. En la movado de pliprodukto kaj ŝparo, multaj estas la kreo, inventoj kaj raciigaj proponoj de la laboristoj. Kaj la sukceso de kamparanaj labormodeloj dependas de plifortigo de planeco kaj organizeco, aplikado de semselekto kaj semtempado, uzado de pli bonaj sterkoj kaj laboriloj kaj plibonigo de tekniko. Por rezisti Usonon kaj helpi Koreion, kaj por konstrui la patrion, ni disvolvos vastan, daŭran kaj fervoran amasmovadon de pliprodukto kaj ŝparo, por efektiviĝi la grandan alvokon de Prezidanto Maŭ Ze-tung!

La Juna Bravulo Liu Ŝing-ven

de Sih-feng (石峯) kaj Kia-lin (家林)



Deknaŭ-jara juna batalanto Liu Ŝing-ven (劉文) estas emancipita kamparano el Miaŭ-nacio de Kuej-ĉou-Provinco (貴州省). La lastan printempon li aliĝis al la ĉinaj popolaj volontuloj kaj iris al Koreio. En la kontraŭatako ĉe Padalbonmonto, dum la Kvina Batalo, Liu Ŝing-ven per sia nekomparebla braveco estis glorie taksita kiel unuagrada popola meritulo kaj ricevis ordenon de la Korea Demokrata Popola Respubliko. Ĉiuj junaj batalantoj de la trupo nomas lin kun estimo "la flago de junulo" kaj ili disvolvis la movadon lerni de Liu Ŝing-ven.

Liu Ŝing-ven estis akceptita kiel volontulo al Koreio post multfojaj petoj. Kiam li petis permeson de la politika gvidanto de rota komando, la lasta trovante, ke li estas tro juna, malgranda kaj malforta, ne konsentis. Liu Ŝing-ven tiam diris: "Kvankam mi nun estas juna, tamen mi pli kaj pli grandiĝos. Cetere, kion mi timas, kiam vi, tiel maljunaj kiel mia patro, ankoraŭ nenion timas?" La rotestro konsilis lin reveni hejmen. Liu Ŝing-ven tamen ploris kaj kriis klarigante kial li nepre devas armeaniĝi. Li diris, "Antaŭ la liberigo, mia patro kulturis por bienulo kaj fosis karbon. Mia patrino kudris kaj flikis por aliaj. Sesjaraĝa, mi jam paŝtis bovojn por la bienulo. Kiam ni pruntis 100,000 juan-ojn de la bienulo, jarfine ni devis repagi 150,000, kaj sekvintan jaron 300,000. Krome ni devis donaci al li vinon kaj kokojn kaj koŭtoŭi* al li. Ni portis sur ni ĉifonon kaj nutris nin per maizo, kaj nur duon-sate. Post la liberigo, antaŭ ol pasis unu jaro, ĉiuj dek anoj de mia familio jam surmetis novajn vestojn. Ni muzikis kaj dancis por bonvenigi la Liberigan Armeon. Patro ofte diris al mi: 'Ni miaŭ-nacianoj finfine vidas la lumon!' Kiu atendis, ke la Usonaj diabloj denove okupis nian Tajvan-on, atakis Koreion kaj volas surgrimpi nian ĉefteron laŭ la malnova vojo de la japanaj diabloj, ke la bienuloj revenu nin supremi. Mi nepre armeaniĝis, ho rotestro! Kvankam mi estas malgrasa, malgranda kaj tro juna, mi garantias tamen iradi 5—10 kilometrojn sen malfacilo." Tiel post ripetitaj petoj, li fine ricevis permeson.

De Kuejĉou-Provinco ĝis Koreio la distanco estas longa je ĉ. 10 mil

lioj. Liu Ŝing-ven unufoje eliris el sia naskiĝloko en la montaro. En Ĉungking li por la unufojo vidis elektrolampojn. Li survaporŝipiĝis kaj vidis Jangze-Riveron. En Hankou li vidis larĝajn bulvarojn kaj kelketagajn konstruaĵojn. Li vidis la grandan ebenajon de Norda Ĉinio. Li vidis fabrikojn kun multaj kamentuboj en la Nordoriento... Ĉiuj tiuj realaj vidaĵoj donis al la juna batalanto edukon. Nun li komprenis kio estas patrio, kial estas dirite ke la patrio estas tre granda kaj kiel oni devas ami sian patrion.

Trans Jalu-Rivero, blanke vestitaj koreoj arde bonvenigis ĉinajn popolajn volontulojn. Liu Ŝing-ven volis vidi koreajn konstruaĵojn, stratojn kaj fabrikojn... sed vane. En Sinuiju estas nur ruinaĵoj. La koreoj nun loĝas en kavernoj aŭ keloj. Liu Ŝing-ven vidis, ke kvar Usonaj aeroplanoj bombardis vilaĝeton dum duonhoro, kaj virino kunportante plorantan infanon elkuris kun brulanta vesto. Tiam en la koro de Liu Ŝing-ven kvazaŭ eksplodis bombo kaj li ploris emociite. La gvidanto diris antaŭ la roto kortuŝite:

"Kamaradoj! Ĉu vi permesas la Usonajn imperiistojn bruligi en nia patrio?"

"Neniam!" ektondris la respondo.

"Kion fari do?"

"Kontraŭbatalu, venku la Usonajn imperiistojn por venĝi la korean popolon!"

Dume, kelkfoje stariĝis Liu Ŝing-ven kun levita pugno kaj pro indigno nur balbute eldiris, "Batalu... batalu... batalu..."

Liu Ŝing-ven estis juna, malgranda, neforta, sed dum militirado, kvankam plene armata li neniufoje postigis, kaj neniam murmuris malkontente pro malsato aŭ laciĝo. Kamaradoj volis lin helpi, sed li rifuzis.

En la eksterma batalo kontraŭ la 38a Regimento de la Usona armeo, dum tri tagoj kaj noktoj Liu Ŝing-ven persistis en la batalejo gardata de la 7a kaj 8a rotoj, kaj fine ekstermis du rotojn de la malamiko. Liu Ŝing-ven estis ankoraŭ unufoje ĉe batalfronto. Li postsekvis Ĉou Ŝin-ĉeng (鄭新成) grupestro de baterio, kompartiano, kaj malrapide grimpas antaŭen. Kiam, kun siblado kaj maŝinapfalo de la malamiko senpaŭze faladis ĉirkaŭ ilin, li ektimeme diris al la grupestro: "Kiel intensa estas la pafado de malamiko!"

"Liuĉjo, ne timu! Kiel ajn intensa ilia pafado, tamen iliaj homoj estas sentaŭguloj. Nur estu singardemaj, kaj ni ne estos frapataj sed male ekstermos la malamikon," ridante kuraĝigis lin la grupestro.

Li grimpis antaŭen imitante la geston de la grupestro, jen rapide jen malrapide laŭ ties rapideco. De

tempo al tempo la grupestro rigardis posten kaj avertis: "Liuĉjo, singarde sekvu min, atentu pri barilo de ferfado, pri subtera mino..."

Ankoraŭ ne ĝisirinte la montpinton, la grupestro estis vundita kaj ne povis grimpi plu. Li diris al Liu Ŝing-ven: "Liuĉjo, tre bedaŭrinde mi jam ne povas gvidi vin. Sekvu do la vicgrupestron." La grupestro tiam malpezis lian ŝarĝon, demetante la kunportatajn tomistron, surtuton, akvobotelon ktp., kaj rigardis lin supreniri. Kiam Liu Ŝing-ven atingis la montpinton, la malamikoj jam estis ekstermitaj de surprizataka trupo, kaj sur la batalekampo la kamaradoj estis huraaŭtaj la triumfon. Liu Ŝing-ven kalkulis, ke pli ol unu regimento da diabloj estis mortigitaj sur la batalekampo, kaj ĉie estis armiloj forlasitaj de malamikoj. Li ĝojegis kaj saltadis kune kun la kamaradoj. Li diris, "La malamiko vere estas papera tigro kiun oni rompas per unu tuŝo." Kaj li fariĝis des pli kuraĝa kaj decidema kontraŭbatali la malamikojn.

La 30an de majo, 2 regimentoj el la 25a divizio de la Usona agresarmeo komencis kontraŭ-ataki Padalbon-monton. La du lojn longa montdorso de Padalbon tute ruĝiĝis de brulego kaŭzita de koncentrigita bombardado de aeroplanoj, tankoj



Koreaj infanoj—Senkulpaj Viktimoj de Usonaj Aeroplanoj

kaj kanonoj. La sentimaj herooj defendante la pozicion forpelis multfojojn da antaŭenpuŝo de la malamikoj. La vicgvidanto Liu Han (劉漢) transigis Liu Ŝing-ven al la rotostabo kaj gvidis lin persone. Ĉar Liu Ŝing-ven estis tro juna kaj spertmanka, dum arda batalado, la vicgvidanto ordonis lin kaŝi sin en tranĉeo. Dum la tria tago de defensivo la batalado estis trece arda. Tiam Liu Ŝing-ven diris al si: "Por kio mi forlasis la patrion kaj venis ĉi tien? Ĉu mi kaŝros en tranĉeo por ĉiam?" Li ne povis sin deteni kaj elsaltinte kuris al la vicgvidanto. Ĝuste tiam pli ol tridek malamikoj sinjetis al ilia batalejo, kaj la vicgvidanto estis vundita je la maldekstra mano, tial li ne povis malfermi grenadkovrilon. Liu Ŝing-ven tiam helpis lin. Poste, kiam la malamikoj estis nur 30 metrojn de ili, Liu Ŝing-ven mem ankaŭ atakis per grenadoj. Fine la pli ol 30 malamikoj estis tute ekstermitaj.

La vicgvidanto denove pligrave vundiĝis je la dekstra brako kaj kriis: "Ho patrio..." Liu Ŝing-ven rapide ĉirkaŭprenis lin, kiu diris: "Liuĉjo, ni rezistas Usonon kaj helpas Koreion por la gloro de la patrio... vi min venĝu..." Tiam alia kuglo trafis lian kapon kaj la vicgvidanto glorie oferigis. Liu Ŝing-ven ploris, kunpremis la dentojn kaj frapis la piedojn. Li jetis grenadojn celante la alvenantajn diablojn. Kvin diabloj estis ekstermitaj kaj la ceteraj forkuris.

Kiam la malamikoj estis repelitaj, Liu Ŝing-ven kunportante keston da grenadoj transkuris al alia batalpozicio, kie maŝinapafilisto Liang Ho-ting (梁和庭) enfiladis la malamikojn. Subite Liang estis vundita, kaj la malamikoj svarme alkuris. Liu Ŝing-ven jetis grenadojn kontraŭ ili, kaj en polvo kaj fumo la diabloj sterniĝis por multe. La vundita kuglolveranto Ĉaŭ Kin-ping (趙金平), ĵus revekiĝinte el sveno, estis ekzaltata de la braveco de Liu Ŝing-ven, kaj per maŝinapfalo forte atakis la malamikojn. Liu Ŝing-ven tiam montris apud li la celajojn kaj kriis: "Ĝuste vi celas, bonege pafas, Jen tri trafitaĵoj... ree unu... ree unu..." Kiam ili sternis amason da diabloj, Ĉaŭ Kin-ping estis refoje vundita je sia brako. Liu Ŝing-ven kuraĝigis lin dirante: "Ni sangas por nia patrio, la sangado estas glora. Ni estu internaciaj batalherooj." Tiel ili alterne faradis bataladon unu post alia, jen per grenadoj, jen per maŝinapfalo. De tagmezo ĝis nokto ili persistis en sia pozicio, kaj forpuŝis 11 fojojn da alatakoj, mortigis pli ol 50 kaj vundis pli ol 100 Usonajn diablojn.

En la fina ekstermbatalo Liu Ŝing-ven faris kuraĝan atakon. Ekvidante ke deklakaj malamikoj estas surgrimantaj al la loko kie la vicgvidanto estas kuŝanta, li maltrankviliĝis timante ke la malamikoj difektos la korpon de la vicgvidanto. Li petis Ĉaŭ Kin-ping ŝirmi lin kontraŭ la malamiko ke li reprenu la lokon. Kiam la malamikoj ankoraŭ ne rimarkis lin, jam eksplodis du grenadoj de li jetitaj meze de la malamikoj. Tri el ili

mortis kaj la ceteraj forkuris rule kaj grimpe. Liu Ŝing-ven prenis la batalpozicion kaj kaptis unu pezajn kaj unu malpezajn maŝinapfalojn, kaj du aŭtopafilojn.

Post la finiĝo de la batalado, Liu Ŝing-ven estis elektita unuagrada meritulo. Antaŭ la nacia festtago, la ĉinaj volontuloj elektis lin kiel reprezentanton de la junaj merituloj, por viziti Prezidanton Maŭ Ze-tung. Ĉe la adiaĉa kunsido, Liu Ŝing-ven laŭte diris al la kamaradoj: "Reveninte nian patrion, antaŭ ĉio mi dankas Prezidanton Maŭ, dankos la popolon de la patrio, kaj mi raportos niajn venkojn kaj bataldecidemon en la fronto. Estante miaŭ-naciano, mi alvokas ĉiujn minoritatojn intime solidariĝi kaj kontribui pli multe da aeroplanoj kaj Kanonojn por subteni la fronton, por plifruge fiasigi la Usonajn imperiistojn."

trad. Valul

* riverenci surgenue

Unuiĝo de la Urbo kaj la Kamparo

Kara Prezidanto Maŭ!

Kun tre ekscitiĝa emocio, ni, 307 kamparanaj delegitoj de la Speciala Distrikto de Junĉeng (運城), Ŝansi-Provinco, raportas al vi pri nia vizitado al la Ekspozicio de Varinterŝanĝo inter Urboj kaj Vilaĝoj de Nordĉinio en Tienzino.

La 4-an de oktobro, ni alvenis Tienzino kaj restis sep tagojn por vizitado. Survoje al Tienzino, ĉie ni ricevis fervoran bonvenigon kaj akcepton de laboristoj kaj urbanejoj. Survoje ni veturis en speciala trajno kaj en Tienzino ni loĝis en tre komforta loko. Laboristoj intime kaj pacience sciigis al ni pri la vivo de urbo. Kiam ni eliris al stratoj, ili kondukis nin, ke ni, kvankam nekompenantaj la urban vivkulturon, sentis nenian maloportunon. Ni kamparanaj delegitoj ricevis respekton kien ajn ni alvenis. Oni donis rabaton por nia aĉetado. Sinjoro Mej Lan-fang (梅蘭芳) speciale por ni ludis ĉinan operon. Ni ricevis senprecedencan fervoran bonvenigon, akcepton kaj estimon: Ni sentis plej altan honoron. Kaj la malnova kompreno pri urboj, kiu restis en la kapo, ja pro tio estis entute neniigita. Pasinttempe, ni kamparanaj alveninte urbon estis malestimataj, malamike traktataj kaj subpremataj de la reacia reganta klaso. Ili trompis kaj ridindigis nin, tial ke ni abomenis urbon, kaj se nur ni havus ian ajn rimedon, ne volis eniri en urbon. Kaj la urbanejoj kaj vilaĝanoj estis dividitaj pro Kuomintang-a reacia regado. Sed de ĉiĵoj vizitado ni komprenas profunde ke sub la novdemokratia reĝimo sub via gvidado, urbanejoj kaj vilaĝanoj jam intime kaj firme unuiĝis, interhelpas unu la alian kaj jam ne ekzistas la dividiteco inter ni. Ni elkore sentas ke la pozicio de laboranta popolo jam trege altiĝis kaj ili havas plej superan gloron. Kaj nia tia ĉi gloro kaj feliĉo povas esti akiritaj nur sub la gvidado de vi kaj de la Komunista Partio. Sen la gvidado de vi kaj de la Komunista Partio, tio neniel estus ebla.

Kara Prezidanto Maŭ! Ni ankaŭ volas diri al vi, ke vizitante la ekspozicion kaj la urbon Tienzino, ni vastigis nian horizonton. Ni vidis propra-okule la abundajn materiojn kaj diversajn altvalorajn produktaĵojn de la patrolando kaj niajn grandajn urbojn, tial ke ni pli profunde sentas nian patrolandon granda kaj kara. Ni loĝas en disaj postrestantaj vilaĝoj, neniam venis en grandan urbon, neniam vidis tramon kaj tiel multe da produktaĵoj de ĉiuj lokoj de la patrolando, kaj neniam vidis per propraj okuloj la antaŭirantan industran konstruadon de la patrolando. Kaj ĉiĵoj en la ekspozicio en Tienzino ni jam

vidis la plejmulton de la supre diritaj aĵoj. Ni ankaŭ veturis per tramo kaj lifto. Ĉio ĉi malfermis novan vojon en nia penso kaj vidigis al ni la perspektivon de venonta nova socio. Pasinttempe oni ofte diris kiel bela kaj feliĉa estas socialisma kaj komunisma socio, sed ni ankoraŭ ne komprenis tiel profunde, kaj post ĉiĵoj vizitado ni jam kredas ke venontempe nia vasta kamparo sendube povos disvolviĝi en la direkto de modernigo kaj industriigo, kaj sendube povos efektiviĝi nian idealan socion. Pasinttempe, se ni havus unu bonon, ni jam sentis nin kontentaj, kaj nun post kiam ni vidis kiel la laboristoj kreas maŝinojn, vidis la grandecon de modernigita urbo, ni sentas ke nia penado ankoraŭ estas tro malgranda kaj ni devas penegre altigi produktadon. Se nur ni urbanejoj kaj vilaĝanoj, precipe ni laboristoj kaj kamparanoj, unuiĝas kaj penegre produktas, firmigas niajn nacian defendon kaj popoldemokratian diktatorecon, la pli bela ideala socio estos nepre rapide efektiviĝita.

Estimata Prezidanto Maŭ! Kiel ni povas ne ĝoji, vidinte tiel grandan kaj karan patrolandon kaj la perspektivon de niaj vilaĝoj! Kiel ni povas ne defendi ĝin! Kiel ni povas ne pozitive kaj penegre produkti por rapide konstrui ĝin! Kara Prezidanto Maŭ! Ni juras batali por la defendo de la patrolando kaj ĝin konstrui per nia tuta forto!


Pasinttempe, ni ankaŭ aŭdis ke la



Modelaj Laboristoj kaj Terkulturistoj Intersangas Spertojn dum Ripozado

laborista klaso estas granda kaj nur ĝi povas gvidi nin emancipiĝi kaj konstrui novan socion kaj antaŭenmarŝi al socialismo. Post ĉiĵoj vizitado, ni pli profunde komprenas la grandecon de la forto de laborista klaso. Iu delegito el ni diris: "Ekzistas neniu en la mondo, kiu povas krei novajn aĵojn kiel la laborista klaso. Nur sub la gvidado de la laborista klaso ni povas ekuzi maŝinojn kaj antaŭen marŝi al modernigo, industriigo kaj feliĉa socio." Kaj ni delegitoj ĉiuj konsentas lian parolon. Kial? Ekzemple, ni nur parolu pri la maŝinoj kiujn ni vidis. La laboristoj de Tienzino ĉiĵare elfabrikis la unuan novtipan enlande produktitan aŭtomobilon. Tiuj de la urbo Tajjuan elfabrikis traktorojn; tiuj de Tienzino elpensis motor-provstablaron, per kiu oni povas ŝpari 60-000 ĝin-ojn da greno en unu jaro. Oni elpensis papermaŝinon, kiu povas produkti du foliojn unufoje kaj pliiĝis

produktadon je 70%; oni ankaŭ fabrikis agrikulturajn maŝinojn, kiuj pli rapidas multoble kompare kun nia manlaboro. La vagonaro, per kiu ni alvenis Tienzino, veturis proksimume du mil liojn en nur pli ol du tagoj. Se ni piedirus, tio ja bezonus ĉirkaŭ unu monaton. Pli la granda urba konstruo de Tienzino estus nebla sen laboristoj. Ili ne nur pliiĝis produktadon, subteni agrikulturon, sed ankaŭ donas seriozan baton al la blokado de imperiistoj. Tial ni devas



Laboristoj kaj Kamparanoj ĉe la Inaŭguro de la Ekspozicio

penegre produkti, liveri al laboristoj provizaĵojn kaj materialojn, por ke ili multege produkti maŝinojn por nia uzo en altigo de agrikultura produkto. Sen la gvidado de laboristoj ni ne povos antaŭeniri, ne povos altigi kaj plibonigi nian agrikulturan produkton.

Kara Prezidanto Maŭ! vizitante la Pezindustrian salonegon kaj la Salonegon de Agrikultura Teknik-plibonigo, ni pli profunde komprenas la gravecon de koopera kaj interhelpa vojo kiun vi montras al ni. Antaŭe, ni nur komprenis, ke per organizigo ni povas ŝpari laborforton kaj povas produkti pli multe, sed ne komprenis ke ni povas uzi agrikulturajn maŝinojn post organizigo. Nun ni jam komprenas profunde ke sen interhelpo ni ne povas uzi traktorojn kaj novajn terkulturojn. Kun malgranda kapitalo de unu familio kaj disaj kampoj oni ne povas uzi agrikulturan maŝinon. Tial hejmenirinte ni mobilizos ĉiujn la vilaĝanojn organizi interhelpon kaj kooperadon, firmigi kaj disvolvi interhelpajn grupojn por iom post iom iri al kolektivigo, produkti per agrikulturaj maŝinoj, altigi produktforton, multigi enspezon, por riĉigi la patrolandon kaj plibonigi nian vivon.

Krome, post la vizitado ni ekkomprenis ke multaj materialoj el vilaĝoj estas plej bezonataj de la urboj kaj povas esti grandkvante eksportataj por intersanĝi maŝinojn. Sed pasinttempe, pro nia sencio, ĉi tiajn aĵojn ni senzorge forjetis kaj difektis—ekzemple porkaj haregoj, kokplumoj, ŝaf-intestoj ktp. Kaj tio ege malpliiĝis la ŝtatan posedaĵon kaj nian enspezon. De nun ni decidis pliiĝi produktadon, aktive organizi nin kaj elsendi la produktaĵojn en urbojn, pligrandigi la intersanĝadon de materialoj inter urboj kaj vilaĝoj por plifirmigi la aliancon de laboristoj kaj kamparanoj. Krome pri organizo



de interhelpado, pri venko super naturdamaĝo, pri plibonigo de tekniko kaj pliiĝo de produkto, ni ankaŭ lernis multajn spertojn, pri kiuj ĉi tie ni ne raportas detale.

Kara Prezidanto Maŭ, ĉiĵoj, kvankam ni vizitis nur kelkajn tagojn, sed ni lernis multe, kaj solvis multajn problemojn en nia penso kaj produktado. Ni tre ĝojas kaj sentas nekompareblan gloron. Por defendi la karan patrolandon, plifortigi la batalon kontraŭ Usona imperiismo kaj por Koreio, plibonigi nian vivon por danki la Tienzinajn urbanejojn por ilia zorgema helpo dum nia restado, plifirmigi la aliancon de laboristoj kaj kamparanoj, kaj disvastigi la intersanĝadon de materialoj de urboj kaj vilaĝoj, ni faros la jenon:

1) Sub la gvidado de vi kaj de la Komunista Partio, ni firme kondukos la popolamason defendi la grandan patrolandon per nia tuta forto. Kion bezonos la patrolando tion ni donos, ĉiam pretaj por ĝin servi. Ni firme kontraŭos la Usonajn imperiistojn kaj helpi Koreion ĝis la fina venko.

2) Ni firme plenumos la tri alvokojn de la Asocio kontraŭ Usono kaj por Koreio, serioze disvastigos kaj plenumos niajn patriotajn kontraktojn, plimultigos produktaĵojn por kontribui armilojn, kaj garantiis ke la vivo kaj la produkto de la familioj de patriotaj martiroj kaj de revoluciaj armeanoj egalas al la niaj.

3) Ni disvolvos la patriotan konkurmovadon por pliiĝi produktadon, kaj liveros al la urbo kaj industrio grenojn kaj materialojn por intimigi la rilaton inter urboj kaj vilaĝoj, disvolvi intersanĝadon de produktaĵoj kaj disvolvi la produktaĵojn agrikulturan kaj industran.

4) Ni disvolvos, firmigos kaj plialtigos la interhelpajn grupojn, ke ili disvolviĝu en ekonomie kooperajn interhelpajn grupojn.

5) Ni propagandos pri la ekspozicio al ĉiuj familioj, ke ni efektiviĝu ĉion, kion ni lernis de la ekspozicio.

Kara Prezidanto Maŭ! la supre diritajn aferojn ni garantias efektiviĝi.

Vivu la Ĉina Popola Respubliko!

Vivu la Ĉina Komunista Partio!

Sanon al kara Prezidanto Maŭ!

Vivu Prezidanto Maŭ!

Kamparanaj Delegitoj de la Kamparana Vizitataro de la Speciala Distrikto de Junĉeng, Ŝansi-Provinco.

Trad. Jang Theing



Novĉiniaj Virinoj en Terkulturo

Lin Vej (林韋)

En la posttagmezo de mia atingo al Ĉuanpi-Vilaĝo (武壩村) en Vuŝiang-Gubernio (武鄉), Ŝansi-Provinco, la vilaĝaj kadroj informis al mi pri la produktoj kaj vivo de la tuta vilaĝo. La produktonivelo en la pasinta jaro jam superis tiun antaŭ la Kontraŭjapana Milito—ĉiu muo produktis 14 tou-ojn* da greno (antaŭ la milito 13 tou-ojn). Laŭ antaŭkalkulo, la produkto en la kuranta jaro estos eĉ plibona. El la 126 familioj en la tuta vilaĝo jam troviĝis nun pli ol 20 familioj, kies agrikultura enspezo en unu jaro povas subteni ilin en manĝo, vesto kaj alia elspezo de 1½ jaroj. Aliaj 30 kelkaj familioj ankaŭ havas restaĵojn. Escepte tri vidvinaj kaj orfaj familioj, ĉiuj aliaj kamparantaj familioj atingis bilancon en enspezo kaj elspezo. Ili ne plu manĝis branon, kaj en vintro ili ĉiuj surportis vitajn pantalonojn. Dum la Kontraŭjapana Milito la tuta vilaĝo perdis 29 bovojn, kaj nun, oni ne nur rehavigis al si tiom kiom antaŭe perdis, sed ankaŭ aldonis pluajn 10 bovojn.

Kio kaŭzis tion?

Vespere mi estis kondukita al la familio de emancipita kamparano Li la Tria (李三) por vespermanĝi. Dum manĝo Li la Tria sidante sur novaĉetita blanka lanfelto, rakontis al mi kiel li fariĝis dungita terkulturisto dum la pasintaj tridek jaroj, kiel li paŝon post paŝo emancipiĝis post alveno de la Popola Armeo kaj kiel lia familio nun vivas en abundo. "Ankoraŭ alia afero min ĝojigas," li diris. "La nunaj virinoj ja estas liberigitaj! Mia edzino alportis ĉi tiun knabinojn." Li montris al mi vangoruĝan fraŭlinon kiu sidis sur la lito silente aŭskultanta. "Ŝi estas 19-jara, nomata Meng-jue (夢月). Emancipita, ŝi laboras kvazaŭ juna viro! Ŝi vektportas akvon kaj sterkon, preparas sterkon kaj irigas veterulon, plugas kaj sarkas; ĉion ŝi povas fari, kion faras viroj. Dum rikolto en somero kaj milia rikolto en aŭtuno, kiam mi ĵus finis mian falĉadon, ŝi jam bone ligis la falĉaĵojn. Sen ŝia helpo mi sola

ja fariĝus tro okupata pro mia laboro!"

La parolo de Li la Tria sugestis al mi, ke partopreno de virinoj al ĉefa laboro en agrikulturo estas la ĉefa ĉenero aŭ unu el la ĉefaj ĉeneroj por ĉi tiu vilaĝo restarigi kaj disvolvi produkton.

La sekvintan tagon mi petis k-dinon Hi-taŭ (希桃), la prezidantino de la Vilaĝa Demokratia Virina Unio, rakonti al mi iom pri la lokaj virinoj partoprenantaj agrikulturan laboron. Ŝi diris, ke ekde la jaro 1944, oni alvokis la virinojn en la vilaĝo partopreni agrikulturan laboron, kaj parto el la virinoj partoprenis la movadon de kulturo de virga tero, kolekto de sovaĝaj legomoj kaj fruktoj por kontraŭrimedi la printempan malsaton. Tamen unuflanke, pro ke la virinoj koncentriĝis al sia laboro, malzorgante la postulon de la familio, kaj aliflanke, pro ke en la movado oni ne rilatigis la movadon al la problemo de virina liberigo, la movado restis senforta kaj nelongdaŭra. Oni poste plibonigis la laboron jaron post jaro, kaj pli efikigis la virinan edukon. Kiam oni speciale prezentis la sloganon "Lernu de Niu Kin-huan (牛金煥)" (Niu Kin-huan estis la unua virino en Ĉuanpi-Vilaĝo, kiu memvole plugis), la evoluo fariĝis pli rapida. En 1948, la virinoj aliĝis al interhelpaj grupoj, kaj komencis kalkuli sian laboran laŭ poentoj. Tion aprobis ĉiuj familioj. En la lastaj du jaroj jam estis 35 virinoj, kiuj tutjare partoprenis la ĉefan laboron de agrikulturo, kaj inter ili estis dudekelkaj, kiuj samkiel Li Meng-jue povis plugi. Generale la virinoj en la vilaĝo partoprenis sezonan laboron, kiel rikolto, maldensigo de junaj plantaĵoj, ktp. La kuran jaron multaj virinoj plugis la tritikon teron; en kelkaj familioj la tuta tero estis plugita de virinoj. Dank' al tio ŝpariĝis multaj viraj laborfortoj por bone prisarki milkampon, por pliprodukti aŭtunan rikolton (prisarki milkampon estas la plej malfacila laboro en agrikulturo).

Post rekomendo, mi faris konvencian tiutage kun tri junulinoj. Ili estas: Li Meng-jue, Li Jun-hua (李潤花) kaj Ma Lan-ŝiang (馬蘭香). La du unuaj estas aninoj de la Junula Ligo, ambaŭ 19-jaraj; la lasta estas 18-jara. Ili kun plezuro diris al mi, ke ekde la lasta jaro ili laboras en sia interhelpa grupo, kaj ofte gajnis plenajn poentojn (10 poentojn), preskaŭ atingis la viran rekordon. Tra la jaro 1950, krom la ĝenerala agrikultura laboro kiel flegado, rikolto ktp. . . . ĉiu el ili termalfirmigis 15 ĝis 20 muojn, plugis 6 ĝis 8 muojn da tritikero, kolektis 5 ĝis 7 ŝarĝojn da ŝafekskremento (ĉiu ŝarĝo pezis 40 ĝin-ojn), kaj tranĉis 700-800 ĝin-ojn da abrotanoj. Ili lernadis eĉ la popola lernejo trifoje ĉiujn dek tagojn kaj ofte kudris dum tagmezo kaj vespero. Pro la konstanta malsano de sia patrino Jun-hua eĉ mem kuiris post laboro.

Mi demandis: "Pro kio vi tiel energie laboras?"

Jun-hua respondis: "Por ĝisfunda liberigo, virinoj devas labori, ne lasante virojn ilin vivteni. Krome ni estas anoj de la Junula Ligo,

kaj tial devas esti modeloj por la aliaj!"

Li Jun-hua estas knabino, kiu komencis vektportati karbon kiam ŝi estis 11-jara. Tamen, ŝi neniel malestimas sin mem aŭ sian laboron, kiel knabinoj en la pasinteco. Vilaĝano al ŝi ŝercis: "Kun vizaĝo brunigita de la suno vi ne povos trovi amanton." Ŝia respondo estis tre simpla: "Kiu ne ŝatas mian brunan vizaĝon, tiu ne rekonas la signifon de laboro, estas malprogresemulo en la nova socio kaj ne havas brilan estontecon. Mi tute ne ŝatas tian homon!" Kion signifas "estonteco"? Li O-ĵing (李娥英), alia 19-jara anino de la Junula Ligo, jene klariĝis: "En malnova tempo, bofilino ne plu suferis de sia vivo nur kiam ŝi fariĝis bopatrino. Kaj nun, virino povas libere elekti ian ajn laboron, se nur ŝi volantas lerni, labori, kaj havas kapablon. En la estonteco, kiam nia agrikultura socio marŝos al industria socio kaj realigos komunismon, ni ankaŭ devos marŝi en la antaŭa vico anstataŭ la malantaŭa."

Sub la gvido kaj antaŭenpuŝo de tia pionira penso, la virinoj de Ĉuanpi-Vilaĝo fariĝis novaj laborfortoj. Ilia laboro estas memkonscia kaj idealhava, kaj estas sekve fortoplana. Ilia memkonscia laboro havas grandan funkcion en la disvolvigo de l'agrikultura produktado.

—Elĉinigiĝis C. Golabio

* 1 tou-o egalas al 1 dekalitro.

Pli da Fervojoj

Hodiaŭ nomadoj en la nordokcidentaj limregionoj de Ĉinio povas havigi al si sufiĉe da teo el Centra Ĉinio. Grandaj terpomoj de Interna Mongolio fariĝas mangajo por la loĝantoj en Ŝanhajo. Bananoj el Kuangtung-Provinco servas kiel deserto en Norda kaj Nordorienta Ĉinio. Mondfamaj Kiangsiaj porcelanaj varoj kiuj estis neaĉeteblaj tra 20 jaroj en Port-Arturo kaj Dajren nun troviĝas en la butikoj de tiuj du marbordaj urboj. Ĉio ĉi tio estas nur unu el la bonoj alportitaj de la rapida disvolvigo de ĉinaj fervojoj.

Kaj pri tio la loĝantoj en Pekino komas eĉ pli bone. Sur stratoj ili ofte renkontas spiritoplenajn heroojn de Ĉinaj Popolaj Volontuloj kiuj revenis el Koreio, terkulturistojn kun blankaj turbanoj el la kamparo kaj reprezentantojn de naciaj minoritatoj vestitaj en bril-koloraj kostumoj el la internaj regionoj. Plejparte per vagonaro ili venas ĉi tien de ĉiuj anguloj de Ĉinio.

En julio 1951 ĉiuj fervojoj sur la ĉina ĉeftero kaj Hajnan-Insulo kun tuta longeco de 22.600 kilometroj ekfunkciis regule por la unua fojo en 14 jaroj. En 8 tagoj vojaĝantoj povas veturi kaj komercaĵoj povas esti transportataj per vagonaro de Manĉouli ĉe Siberia bordero trans la landon al Kantono—urbo sur la suda marbordo de Ĉinio. En malpli ol 4 tagoj vojaĝantoj povas veturi de Lienjungkang surborde de Flava Maro foren laŭlonge de la Flava Rivero al la geografia "koro" de Ĉinio—Tienŝui (天水) en Kansu-Provinco (甘肅省).

Tio estas la rezultato de la energia penado fare de ĉinaj fervojaj laboristoj. En Nordorienta Ĉinio ili

anstataŭigis 40 procentojn de la rel-traboj. Ili ankaŭ riparis 80 procentojn de la lokomotivoj, 40 procentojn de la pasaĝeraj vagonoj kaj 25,7 procentojn de la ŝarĝ-vagonoj damaĝitaj de japanaj invadantoj kaj Kuomintangoj. Kaj ili restarigis ĉiujn fervojajn riparejojn severe damaĝitajn.

Aperis elstaraj rekordoj pri la funkcio de la fervojoj en Norda Ĉinio. Ekzemple, la 449 metrojn longa Huaj-Rivera Ponto sur la Tienzin-Pukoŭ-a Fervojo (津浦鐵路) estis rekonstruita en 2 monatoj. La Cingtaŭ-Zinan-Fervojo (膠濟鐵路) en Santung-Provinco, kiu estis grave damaĝita, estis restarigita nur en 1 monato.

Rapida disvolvigo venis post la restarigo. Frue en 1905 estis jam faritaj proponoj por la konstruado de la Ĉengtu-Ĉungking-Fervojo (成渝鐵路) en Seĉuan-Provinco. Sed ĉiuj la sekvantaj jaroj alportis nenion krom konferencoj kaj planoj surpaperaj. Neniu bone scias kiom da mono de la popolo estis kolektita de la sinsekvaj reakciaj reĝimoj surbaze de la preteksto ke la plano estis realigota. En decembro de 1951, nun du jarojn post la liberigo de Seĉuan, trafiko jam komenciĝis sur unu parto 284 kilometrojn longa de tiu fervojo.

La Kuomintanga registaro havis la planon por la Lajpin-Cennankuan-Fervojo (來鎮鐵路) preta dum 13 jaroj. Sed la laboro estis finfine komencita de la Popola Registaro en septembro de 1950 kaj la fervojo 417 kilometrojn longa komencis funkcii je la 7a de novembro de tiu ĉi jaro.

En Nordokcidenta Ĉinio la Tienŝui-Lanĉou-sekcio de la granda Lunghaj-arterio estas nun konstruata.



Nordokcidentaj Virinoj en Terkulturo Lignogravuraĵo de Kuo Zun-ĉing

LA ANTAŬENIGANTAJ ĈINAJ LERNEJOJ

Ven Ĉiaŭ

DUM jarcentoj Ĉinio estis konata kiel nacio kun analfabeta proporcio de ĉirkaŭ 90 procentoj el sia tuta loĝantaro. Sed nun tio estas ne plu vera, ĉar Ĉinio jam faris grandan paŝon antaŭen en la kampo de edukado dum la lastaj du jaroj post la fondiĝo de la nova respubliko.

La nombro de lernejoj estas konstante pligrandiganta, kaj multaj lernejoj estas starigitaj eĉ en tiuj foraj aŭ montaj regionoj kie neniu eduka laboro estis iam provita antaŭe. Nekompletaj statistikoj montras ke Ĉinio hodiaŭ havas entute 445,700 lernejojn, t. e., 37 procentojn pli multe ol en 1936, la lasta jaro antaŭ la Kontraŭjapana Milito.

La registaro penis doni la edukan oportunecon al kiel eble plej multe da popolanoj. Sekve la nombro de lernantoj en la lernejoj rapide kreskis. Kompare kun 1936, la lernantoj 101-procente pliiĝis en elementaj lernejoj, 151-procente pliiĝis en mezgradaj lernejoj, kaj 229-procente pliiĝis en kolegioj. Pli ol 40 procentoj de la lernejaĝaj infanoj en la tuta lando nun vizitas lernejon, dum en la Kuomintangaj tagoj la plej alta proporcio estis malpli multe ol 5 procentoj. Nuntempe, ĉiuj infanoj lernejaĝaj en Porto-Arturo kaj Dajren en Nordorienta Ĉinio estas en lernejo. Grandaj klopodoj estas farataj por ke en la venontaj ses jaroj, 80 procentoj de la tutlandaj infanoj sepjaraĝaj kaj pliaĝaj vizitu

lernejon. Tamen la cifero en la malnove liberigitaj regionoj supozeble atingos ĉirkaŭ 90 procentojn.

Kio plej karakterizas la hodiaŭan edukadon en Ĉinio estas la ĉiutage pligrandiganta nombro de la lernejon vizitantaj infanoj de laboristoj kaj kamparanoj. En la pasinteco kiam lernejoj ekzistis nur por la idoj de la privilegiita klaso, infanoj de laboristoj kaj kamparanoj ne havis oportunon por lernado. Sed la liberigo malfermis la lernejan pordon por ili. En la malnove liberigitaj regionoj, el ĉiuj dek lernantoj, ok estas infanoj de laboristoj kaj kamparanoj, dum sub la Kuomintangareĝimo, la nombro de ili estis preskaŭ nulo.

En Nordorienta Ĉinio, proksimume 85 procentoj de la lernantoj en la elementaj lernejoj venas el hejmoj de laboristoj kaj kamparanoj. Preskaŭ ĉiu vilaĝo en tiu regiono havas sian propran elementan lernejon. La ŝanĝo de klaskompono de lernantoj en Ŝantung-Provinco (山東省) estas speciale okulfrapa. Infanoj de tiea laboranta popolo konsistigas pli ol 94 procentojn de la tuta nombro de elementlernejaj lernantoj, kaj pli ol 91 procentojn de tiu de mezlernejaj

lernantoj. Ĉar ilia vivnivelo estas altiganta tagon post tago, la laboristoj kaj kamparanoj estas nature avidaj sendi siajn infanojn al lernejo. Kelkfoje ili eĉ fondis lernejojn je sia propra pago kiam ili rimarkis la mankon de tio sialoke.

Laboristoj kaj kamparanoj mem estas ankaŭ provizitaj per edukado por la unua fojo dum sia vivo. Krom 37 mallongperiodaj laboristokamparantaj lernejoj, troviĝas en Pekino Popola Universitato kiu estis speciale fondita por la laboristoj kaj kamparanoj. Kun sia eduka sistemo bazita sur la spertoj de Sovetio sed adaptita al la bezonoj de Ĉinio, la Popola Universitato estas alta eduka instituto laŭ tute nova tipo. Nun pli ol du trionoj el la 3,000 studentoj en ĝi estas aŭ progresemaj industriaj laboristoj aŭ kadroj de laborista aŭ kamparana origino havantaj jarojn da revoluciaj spertoj. Tie estas ankaŭ multaj labormodeloj, viraj kaj inaj. Ili estas studentaj ekonomion, ekonomian planadon, financon, komercon, fabrikadministradon, leĝon kaj aliajn sciencojn, sub la gvido de spertaj ĉinaj kaj Sovetiaj profesoroj.

Radikalaj ŝanĝoj nun okazas en la lernejoj de nova Ĉinio. Kursoj dissemantaj faŝistajn kaj feŭdajn ideojn estas senrezerve forigitaj. Nun oni strebas por korekti la malnovan tendencon disigi teorion aparte de praktiko. Studentoj de hidraŭlika inĝenierscienco estas studentaj la Flavan kaj Jangze-Riverojn de Ĉinio anstataŭ la Mississippi-Riveron aŭ la TVA projekton de Usono. Medicinaj studentoj de Pekina Universitato kaj Ĉina Unia Medicina Kolegio, antaŭe konata kiel Pekina Unia Medicina Kolegio, ĵus revenis de la regiono de la Huaĵ-Rivero kie ili faris servon medicinan al la milionoj da digo-laboristoj dum la pasinta somero. 300 studentoj de leĝoscienco el la ĉefurbo estas nun partoprenantaj en la agrarreformo laboro en la Centrasuda Ĉinio. Multaj el ili servas kiel juĝistoj ĉe la popolaj tribunaloj.

Krom la regulaj lernejoj, la Popola Registaro ankaŭ prizorgas la liber-

tempajn lernejojn por laboristoj kaj kamparanoj kiuj montris egan soifon al scio post liberigo. En la unua duono de 1951, 1,718,000 laboristoj ricevis senpagan kulturalan kaj teknan edukadon en multaj libertempaj lernejoj por dungitaj laboristoj. Ĉi tiu cifero estis pli ol duoblo de tiu dum la sama periodo lastjara. Rezulte de tio la kultura kaj teknika nivelo de la laboristoj estas multe plialtigitaj kaj sekve ankaŭ la produkto leviĝas. Multaj laboristoj estas promociitaj al administrataj kaj teknikaj postenoj.

En la kamparo, kamparanoj vizitis vintrajn lernejojn grandnombre. 25,000,000 partoprenis en la "vintra studo" en 1950. Ĉi tiu nombro estis 150 procentojn pli granda ol tiu en 1949. Granda proporcio de la vintraj lernejoj estas transformita en libertempajn lernejojn, kie la ĉijara nombro de lernanto atingis 10,000,000. Ĉi tia libertempa studo ludas gravan rolon en la lukto por elimini analfabetecon inter la kamparanoj. La normala kamparana lernanto en la vintra lernejo nun povas koni 700 ideografojn kaj skribi simplajn leterojn.

La Centra Popola Registaro estas la unua registaro en Ĉinio kiu montras tian zorgon je la disvastigo de edukado inter la naciaj minoritatoj. Granda sumo da mono estas asignita por tiu celo. Nuntempe ĉirkaŭ 780,000 lernantoj estas lernantaj en pli ol 9,000 elementaj lernejoj por naciaj minoritatoj. La lecionoj estas instruataj en la lingvo de ĉiu aparta nacia grupo. Krom la Centra Kolegio de Nacioj en Pekino, la registaro ankaŭ starigis kolegiojn en Nordoriento, Sudokcidento kaj Nordokcidento por trejni kadrojn el la naciaj minoritatoj mem.

La ĉinaj edukistoj ne sentas sin kontentaj pri la atingoj akiritaj dum la pasintaj du jaroj. Ili datre klopodas por akiri pli brilajn sukcesojn por konformiĝi al la bezonoj de la venonta landa konstruado kiu estos eĉ pli titana en amplekso ol la nuna.

Trad. Nojo Lo

por Nova Ĉinio

Laŭlonge de tiu vojo sin trovas multaj krutegaj montoj.

Pro la konstruado de novaj fervojoj pli da vagonoj estas bezonataj. Kompare kun la antaŭa jaro la nombro de lokomotivoj plimultiĝis 30 procentojn en 1950, vagonoj 95 procentojn kaj ŝarĝ-vagonoj 31 procentojn.

Fervojaj laboristoj iniciatis kampanjon "porti pli multe kaj veturi pli rapide." Dum japana okupado ĉiu lokomotivo en Nordorienta Ĉinio trenis meznombro nur ŝarĝon de 1,000 metraj tunoj. Antaŭ nelonge la lokomotivo N-ro 1163 kreis novan rekordon de 6,062 metraj tunoj. En la unua duonjaro de 1951 la rapideco de ŝarĝ-vagonoj meznombro pligrandigis 5.6 procentojn kompare kun tiu de la antaŭa jaro kaj 50.7 procentojn kompare kun tiu de la tempo de japana okupado. En januaro 1950 vojaĝantoj bezonis 64 horojn veturante per vagonaro de Ŝanhajo al Kanton sed nun ili bezonas nur 50.

La fevojaj laboristoj estas tre zorgemaj pri lokomotivoj. En Nordorienta Ĉinio ĉiu lokomotivo estis laŭkute riparata post veturado de 50,000 kilometroj kaj tiam estis ofte necese fari plenan riparon. Antaŭ nelonge lokomotivo N-ro 1124 kreis rekordon de 275,790-kilometra veturado sen ĝenerala riparo kaj akcidento.

Rezulte de la senĉesaj klopodoj de la laboristoj malplialtiĝis la transporta kosto por ĉiutagaj necesajoj kaj la veturkosto por vojaĝantoj. Kompare kun 1937, ekzemple, la ŝarĝ-kosto malplialtiĝis 62 procentojn por karbo, 69 procentojn por salo kaj 54 procentojn por faruno. Por vetur-biletoj la prezo malaltiĝis 57.8 procentojn.

Dum la pasintaj tagoj veturi per vagonaro estis neniel facila kaj sekura afero, ni ja ne parolu pri komforto kaj ĝuo. Vojaĝantoj kun vetur-biletoj estis ofte devigitaj stari la tutan vojon dum la Kuomintangaj soldatoj okupis la sidlokojn kaj kelkfoje rabis la vojaĝantojn. Ofte okazis ke tiuj vojaĝantoj, kiuj ne povis eniri la malpuran kaj plenigitan vagonaron, devis loki sin sur la tegmentojn kaj kelkfoje estis deskuikitaj teren kiam la balanciganta vagonaro rapidis antaŭen.

Nun ĉio prenas tute alian aspekton. Oni ĉiel klopodas por pligrandigi la komforton kaj ĝuon de la vojaĝantoj. Ĉiuj vagonoj estas puraj kaj bone aranĝitaj. Muziko kaj novaĵoj estas brodkastataj per disaŭdigiloj en la vagonaro. La laborantoj sur vagonaro sin movas tien kaj reen kaj estas ĉiam pretaj fari servon al la vojaĝantoj. Sur kelkaj fervojoj troviĝas specialaj vagonoj por patrinoj vojaĝantaj kun infanoj.

La ĉinaj fervojaj laboristoj havas longdaŭran tradicion de lukto. Depost 1923 kiam strikis la laboristoj de la Pekin-Hankou-Fervojo, ili ĉiam daŭrigis sian malcedeman bataladon kontraŭ imperistoj kaj feŭdaj militaristoj. Dum la liberiga milito kontraŭ la Kuomintanga reaciularo ili riparitis detruitajn fervojojn kaj faciligis la movadon de la Popola Liberiga Armeo. Kaj nun, post la landskala triumfo, ili plenumas tiajn mirigajn agojn kiuj neniam antaŭe montrigis en la ĉina historio. Konstruante fervojojn, ili samtempe helpas Ĉinion transformiĝi de lando agrikultura al lando industria kie la popolo vivas pli gajan, kontentan kaj riĉan vivon.

I. K.



Gelaboristoj Iras Viziti Lernejon

Lignogravuraĵo de Ku Juan

La Kotonmaŝino

(daŭrigo)

Ma Feng (馬峯)

III

Majstro Sung afliktiĝis ne nur pro tio, ke la kooperativo fortris liajn klientojn. Estis aliaj, gravaj kaŭzoj:

En la jaro 1940, post la starigo de la nova reĝimo, oni kuraĝigis ekonomian revivigon per memhelpo, disvastigante la teksadan metion kaj koton-kulturon. En Ĉangĉiaĉuang, neniu antaŭe kreskigis kotonon sur la vasta ebena tero. Kvan-kam la registaro tiam prunte disdonis monon kaj semojn por koton-kulturo, kaj provis ĉiel konvinki la popolon, tamen neniu volis fari tion. Iuj ne sciis kiel kulturi la novan plantadon, aliaj timis, ke la kulturo de tio alportus malpli da enspezo. Tiam ĉie bolis diversaj komentoj, same kiel la tumulto nun kreita pro la aĉeto de la koton-maŝino. Nur dank' al Majstro Sung la malfacilo estis solvita.

La Hejmvilaĝo de Majstro Sung troviĝis en Honan-Provinco. Li rifuĝis al Ĉangĉiaĉuang kune kun sia filino, kiam lia edzino mortis pro malsato kaj malsano dum la pluvmanko ĉe lia hejmvilaĝo kaj li trovis nenian rimedon por vivsubteno. La registaro tre zorgis pri la rifuĝintoj, pruntis al ili manĝaĵojn kaj disponis al ili kulturan teron. Tiel Majstro Sung starigis sian hejmon ĉe Ĉangĉiaĉuang. Majstro Sung scipovas la kulturon de kotono ekde infango. Aŭdinte ke la registaro alvokis por koton-kulturo, li tuj memvolonte klarigis al la vilaĝanoj pri la profito de tio, kaj pri la metodo kaj procedo en la kulturo. Sed, kiel ajn elokvente li parolis, la vilaĝanoj ne kredis. Ili diris: "Ni atendu ĝis la sekvanta jaro." Tiujare, nur Majstro Sung kreskigis kotonon sur la du muoj da ebena tero de li luita. En la aŭtuno, la kampo de Majstro Sung kovriĝis plene de neĝblanka kotono. La tuta vilaĝo fariĝis ekscita pro tio. Ĉiutage, grupoj da viroj kaj virinoj alvenis por vidi la strangaĵon... Sur la du muoj da tero de Majstro Sung rikoltiĝis cent kaj okdek ĝinoj (1 ĝino = ½kg.) da kotono, kiu, laŭ la merkata prezo, donis profiton trioble de tiom el grenproduktado. La sekvantan jaron, plimultiĝis la homoj kiuj kreskigis kotonon. Ĉiuj petis la konsilojn de Majstro Sung, kiu poste fariĝis koton-kultura direktoro je la invito de la vilaĝa registaro. Eke de tiam, li ĉiutage vizitis ĉiujn kulturistojn, donante instruojn kiel trempli la kotonsemojn, kiel ilin dissemi, kion fari al la elkreskaĵoj kaj kiaj estas senfruktaj kaj ceteraj branĉoj. Eĉ momenton li ne sidigis dum la tuta tago. Iu ĉe ĉi parto de la kotonkampo vokis: "Majstro Sung, venu rapide, kia speco de branĉo estas tiu ĉi?" kaj aliu ĉe tiu parto ankaŭ vokis: "Majstro Sung, venu por nin instrui!"

Majstro Sung estis same fervora al ĉiu ajn, kurante orienten kaj okcidenten, pacience klarigante kaj konsilante. Neniam montriĝis ĉe li la sento de malpacienco. Ju pli okupata, des pli ĝaja li fariĝis. Li ofte ĉercis kun la aliaj, kaj oni ankaŭ pli intimiĝis kun li.

Tiujare, la koton-rikolto estis granda sukceso. La kooperativo aĉetis kotondesemigan maŝinon per monprunto de la registaro. Sed oni trovis neniu por vatigi la desemigitan kotonon. Majstro Sung estis spertulo en koton-vatigado. Li aĉetis koton-arkon kaj batilon kaj komencis kotonvatigi. Kiam plimultiĝis la koton-kulturistoj jaron post jaro, Majstro Sung sola ne povis fari ĉiom da laboro. Li akceptis kiel metio-lernanton Ĉang Paŭ-paŭ, kiu esprimis sian volon lerni la metion, kaj post nemultaj jaroj li ellernis ĉion pri la metio de Majstro Sung.

Pro sia merito en la koton-kulturo ĉe Ĉangĉiaĉuang, kaj pro sia penado en produktado, Majstro Sung en 1944 estis elektita labor-heroo per la voĉdonoj de la tuta vilaĝo, partoprenis la tutgubernian kunvenon de laborherooj, ricevis premiojn, estis priskribita sur tagjurnaloj, kaj la guberniestro persone salutis lin per tosto. Post tio, pli disvastiĝis la famo de Majstro Sung. Ĉiuj najbaraj vilaĝoj eksciis pri tio, ke ĉe Ĉangĉiaĉuang estis koton-kultura heroo kiu estis spertulo en koton-vatigado. Majstro Sung fariĝis eĉ pli okupata. Registraraj oficejoj kaj lernejoj en la proksimo invitis lin fari raportojn; najbaraj vilaĝoj sendis homojn lerni de li la sperton. Kaj li devis samtempe mem produkti kaj helpi al la aliaj. Car li tre lerte laboris en kotonvatigado, eksterordinare multmultiĝis liaj klientoj. Kiam la koton-semoj estis ĵus dissemataj, oni jam antaŭe aranĝis kun li pri la kotonvatigado. Poste, homoj ĉe aliaj vilaĝoj ankaŭ petis Majstron Sung vatigi kotonon por ili; eĉ la kostum-fabrika de la registaro invitis lin vatigi por si dum kelkaj monatoj.

Majstro Sung, kiu antaŭe penis tiom multe por la koton-kulturo de Ĉangĉiaĉuang, kiu estis tiel arde amata de la amaso, kiu iam akiris tian atenton kaj laŭdon de la registaro, nun estis postlasita de la tempo. La koton-maŝino rompis lian manĝelpelvon, forrabis ĉiun lian honoron kaj gloron. Kaj tiu kiu forrabis la honoron kaj gloron estis neniu alia ol lia propra lernanto. Ekmemorante pri la pasinta prospero kaj rigardante al la hodiaŭa stato, Majstro Sung povis neniel sin deteni de ĉagreniĝo kaj kordolorado.

Dum kelkaj tagoj, Majstro Sung fariĝis tute alia homo, malbonhumora kaj ne ridema. Li ofte koleriĝis je ŝiaŭ-oh, malpermesis al ŝi iri al la kooperativo. Kva-zaŭ forlasita edzino, li nun sentis sin soleca, malesperiga, malfer- vora. La sono de la kotonmaŝino en funkcio, la rido kaj parolo de la geviroj en la fronta korto kontrastis kun lia kvietita soleca hejmo, liaj ripozan- taj koton-arko kaj koton-batilo. Ju pli li pensis, des pli li afliktiĝis kaj enviis. Li volus kuri al la fronta korto por disrompi la diablan kotonmaŝinon per hakilo.

Iunokte, tuj post endormiĝo, Majstro Sung subite aŭdis tamtamadon. Li senprokraste sin- vestis kaj kuris sur la straton. Ĉiuj la vilaĝanoj nun kuris en la direkto de la vilaĝa registara oficejo. Sekvinte la amason, ankaŭ li atingis la oficejon. Tie okazis amaskunveno, kunvokita pro la alveno de la distriktestro, kiu nun starante sur la ŝtupo parolis: "Laŭdire, via vilaĝo aĉetis kotonmaŝinon. Kia sensencaĵo! La fibroj de la vatigita kotono tute rompiĝis! Ĉu vi celas pliigi produkton aŭ ruiniĝi produkton?" Kaj li sin turnis al Ĉang la Pliaga kaj lin riproĉe demandis: "Kiu aprobis al via aĉeto de la kotonmaŝino? Kiu respondecas por tia granda kvanto da kotono damaĝita?!" Ĉang la Pliaga preskaŭ ploris pro riproĉo. Ankaŭ Ĉang Paŭ-paŭ embarasite frotis la manojn ĉe la apudo. Majstro Sung tre deziris salti sur la ŝtupon por eldiri kelkajn vortojn, sed, antaŭ ol li sukcesis antaŭen sin puŝi, iu tiris lin de la malantaŭo. Kapturminte, li vidis la patrinon de Er-tan, kiu flustris kun plorama mieno: "Majstro Sung, ankorau vi vatigu por mia hejmo la kotono. Por ŝpari iom da laborpago, miaj kelkdek ĝinoj da kotono estas tute damaĝitaj de la kooperativo!" Tuj poste, kelkaj aliaj ankaŭ proksimiĝis al Majstro Sung, ĉiuj petante ke li vatigu la kotono por ili. Majstro Sung promesis al ĉiuj. Post la kunveno, la distriktestro speciale invitis Majstron Sung por intervjuo. La estro diris: "Sungĉjo, bone daŭrigu la vatigan laboron, ne zorgu pri la pasintaĵoj!" Majstro Sung ripete kapjesis. Poste la distriktestro sendis malmunti kaj forporti la maŝinon. Kaj la vilaĝanoj sendis ĉiom da nevatigita kotono al Majstro Sung, ĉe kies hejmo ankoraufoje amasiĝis pakajoj de kotono. La koton-arko de Majstro Sung denove eksonoris: "Peng, peng—dang, peng, peng—dang!" Guste kiam li estis vatiganta energie, li aŭdis laŭtan tumulton. Li malfermis la okulojn kaj trovis, ke jam tagiĝis; li ĵus sonĝis. Tiam la kotonmaŝino en la fronta korto estis bruanta sentese. Rememorante pri la sonĝo, Majstro Sung des pli malĝojigis.

La sekvantan antaŭtagmezon, la patrino de Er-tan faris viziton al Majstro Sung. Vidante la koton-arkon pendantan sur la muro, ŝi ride diris: "Kiel, Maljuna Koton, tute sen kliento? Mi konsilas, ke vi ankaŭ lernu manipuli la maŝinon!" Majstro Sung memoris, ke la patrino de Er-tan jam sendis sian kotonon al la kooperativo, kaj nun eĉ aŭdis de ŝi tiajn mokemajn vortojn. Majstro Sung ruĝiĝis de kolero, li dezirus ŝin eligi per piedbato. Sed li finfine sindetenis, kaj rapide respondis: "Mi ne deziras vatigi. Dum la lastaj kelkaj tagoj mi ne bonfartas, eĉ la manon mi ne volas levi. Kelkaj vilaĝoj sendis por mi, sed mi ne promesis iri!" Li ne volis sin humiliĝi antaŭ la patrino de Er-tan; li ne volis publike konfesi sian malsukceson. Tial li fabrikis kelkajn vortojn malverajn kiel ŝmirilon por sia hontindaĵo. Sed la patrino de Er-tan jam prenis ilin kiel verajn.

IV

Informo pri malsaniĝo de Majstro Sung tre rapide rondiris tra la tuta vilaĝo. Oni ja ne forgesis pri la boneco de Majstro Sung. Nun, aŭdinte ke li malsaniĝis, multaj homoj tuj faris al li viziton. Ĉe lia hejmo, viroj kaj virinoj en duopoj aŭ trippoj alvenis kaj forlasis. Iuj alportis ankaŭ ovojn aŭ diversspecajn legomojn kiel donacaĵojn. Ĉiuj zorgeme pridemandis pri lia sanstato: "Kia malsano? ĉu grava aŭ ne grava? Majstro Sung devis iel respondi dirante ke estas malvarmumo, ke estas ne tre grave. La vizitantoj ĉiuj petis ke Majstro Sung bone ripozu, kaj admonis, ke ŝiaŭ-oh bone prizorgu pri li. Tiu vesperon, Ĉang la Pliaga kaj Ĉang Paŭ-paŭ ankaŭ venis lin viziti malgraŭ sia okupateco. Kaj Paŭ-paŭ kunportis iom da vermicelo kiel donacaĵon. Ĉang la Pliaga proponis iri al Liučiaŝan (劉家山) por venigi kuraciston.

"Mi iru," diris Paŭ-paŭ. "Vi, en tia aĝo ne facile trairas la malluman vojon."

"Ne gravas," respondis Ĉang la Pliaga. "Vi jam laciĝis post tuta tago laboro. Kaj vi ankaŭ devos labori morgaŭ. Plibone mi iru!"

Aŭdinte tion, Majstro Sung fariĝis tre embarasita. Li insistis: "Ne ĝenu vin mem! Estas nur eta malsano. Mi povos resaniĝi post kelkaj tagoj!" Sed Ĉang la Pliaga admonis: "Eta malsano



Fari Planon de Produkto

Lignogravuraĵo de Liu Kien-an

venigos gravan malsanon. Prefere pli frue konsigliĝu kun kuracisto!" Tion dirinte, li foriris kun Ĉang Paŭ-paŭ.

Ege embarasite Majstro Sung rapide diris al Siaŭ-oh: "Rapidu por diri al ili, ke ili ne iru por kuracisto."

Siaŭ-oh ŝtele ridis kaj kuris al la antaŭa korto. Enirinte la kooperativon, ŝi vidis, ke Ĉang Paŭ-paŭ, en kotonvatita vesto, ĝuste pretiĝis por foriri. Ĉang la Pliaga diris: "Diru al S-ro Liu, se li ne povus veni tuj, li venu morgaŭ matene." Siaŭ-oh skuadis la manon, kaj vidante ke ne troviĝas iu ajn nekonato, ŝi diris kun rido: "Ne blinde klopodu! Mia patro tute ne estas malsana."

Ambaŭ Ĉang la Pliaga kaj Ĉang Paŭ-paŭ demandis mirigite: "Kio? ne malsana?"

"Malsana li estas ne korpe sed kore," respondis Siaŭ-oh, kaj ŝi ekrakontis pri la aflikto de sia patro dum la lastaj kelkaj tagoj. Fine ŝi konkludis: "La kotonmaŝino de la kooperativo forrabis ĉiujn klientojn de mia patro, pensu, kiel li povus esti ĝoja?"

Ĉang la Pliaga frapis la kapon al si kaj diris: "Ho, estas tute mia kulpo! Dum la lastaj kelkaj tagoj, mi nur zorgis pri varbo de klientoj kaj tute forgesis pri la tasko lernigi Majstron Sung pri la maŝino." Poste li ankaŭ kulpigis Siaŭ-oh: "Kial vi ne plifrupe diris al ni pri tio?"

"Ne kulpigu," Siaŭ-oh diris. "Ankaŭ mi multe suferis dum tiuj ĉi kelkaj tagoj. Li afliktiĝis ĉe la koro, kaj en kiu tago li ne kelkfoje min riproĉis? Li eĉ ne permesis min veni al la kooperativo. Krome ofte troviĝas multaj homoj ĉi tie, kaj ne estas oportune fandiĝi pri ĉi tiu afero, ĉu ne?"

"Jen kial," rimarkis Paŭ-paŭ, "kelkfoje mi iris al via hejmo, sed via patro eĉ rigardon ne jetis al mi. Fakte li min malŝatas!"

"Laŭ mi, ni devas elpensi rimedon lernigi Majstron Sung pri la maŝino," diris Ĉang la Pliaga. "Li ja ne estas tia ega obstinulo. Eble li portempe ne komprenas. Ni ankaŭ nesufiĉe zorgas pri li. Nun ni devas persvadi lin ĉiu laŭ sia povo."

La triopo interdiskutis dum iom da tempo kaj Siaŭ-oh reiris al sia hejmo.

La sekvantaj tagoj, pli da vilaĝanoj faris viziton al Majstro Sung, pensante ke li vere malsaniĝis, kvankam fakte Majstro Sung ja ne estis malsana. Ili demandis pri lia sanstato kaj admonis lin konsulti kuraciston. La prizorgemo kaj simpatio de la samvilaĝanoj kortuŝis Majstron Sung. Li sentis varmon en sia koro kun neeldirebla emocio. Tiel, lia kolero iom post iom kvietiĝis.

En la posttagmezo, Ĉang la Pliaga ankoraŭfoje lin vizitis. "Pli bone hodiaŭ, Sungĉjo?" alparolis Ĉang lin ekvidinte.

"Multe pli bone!" diris Majstro Sung. "Ne estas grave, hm, bagatelo!"

Tiam Ĉang la Pliaga jam sidigis sur la briklito, ekfumis kaj ekbabilis. Li unue parolis pri la kondiĉo en la urbo Tajjuan kaj poste pri la tempo kiam Ĉangĉiaŭang komencis kulturi kotonon. "Estas tute dank' al via helpo ke en nia vilaĝo disvastiĝas kotonkulturo," diris Ĉang la Pliaga. "Alie, eĉ unu kotonplanto ne troviĝus ĉe ni. Komence, ankaŭ mi ne estis konvinkita pri la profito de koton-kulturo. Multaj aliaj estis dubemaj. Ni pensis, ke estis neeble kreskigi kotonon sur nia tero kie por generacioj ne kreskis tio. Poste vi la unua surpaŝis la vojon kaj gajnis profiton kaj ni eklernis de vi kiel kulturi!"

"Oni ja diras: Kom longe vi vivas, tiom longe vi lernas," aldonis Siaŭ-oh.

"Prave!" diris Ĉang la Pliaga. Liuĉjo (老劉) kaj Tienĉjo (老田), kiuj antaŭ du jaroj kondukis agran reformon en nia vilaĝo, nun estas en Tajjuan. Renkontante min surstrate Liuĉjo diris: "Ni nun estas en fabriko kaj lernas de la laboristoj. Ne estas eble konstrui nian landon sen lerno de kio estas nova."

Dum Ĉang la Pliaga babilis, Majstro Sung ankaŭ de tempo al tempo aldonis rimarkojn. Fine, Ĉang la Pliaga alvenis al la aĉeto de la kotonmaŝino. Li ekinstigis ke Majstro Sung ankaŭ lernu. "Ne estas malfacile lerni manipuli la maŝinon," li diris. "Paŭ-paŭ ellernis ĉion en Tajjuan dum kvin aŭ ses tagoj?"

"Lasu tion ĝis poste!" diris Majstro Sung.

Ĉang la Pliaga ne plu daŭrigis la persvadon. Li diris dum 'adi aŭo: "Venu al la antaŭa korto por distriĝo!"

Tiun posttagmezon, aŭdinte ĝojan bruon en la antaŭa korto, Majstro Sung vole-nevole paŝis tiun direkton. Fakte, Majstro Sung ankoraŭ ne detale rigardis al la kotonmaŝino, kiu tiel subite forrabis ĉiujn liajn klientojn. Li ankoraŭ ne sciis kiel ĝi funkciis, ĉu la rezulto estis sufiĉe bona. Atinginte la lokon, li vidis, ke ĉirkaŭ la pordo de la okcidenta ĉambro en kiu staras la kotonmaŝino amasiĝas multaj homoj. Vidante Majstron Sung alvenanta, ili elkore pridemandis: "Pli bone nun, Majstro Sung?"

"Neniom grave," Majstro Sung kapjesis.

La patrino de Er-tan ekkaptis lin je la mano kaj diris: "Maljuna Koton, mi ja maltrankviliĝis pro via malsano. Mi timis, ke vi mortos! Venu rigardi al la maŝino!"

Majstro Sung jam puŝis sin al la pordo, de kie li vidis Ĉang Paŭ-paŭ sidanta sur la benko malantaŭ la kotonmaŝino, liajn piedojn tretantaj alterne, la radojn de la maŝino fluge turniĝantaj, liajn manojn senese enŝovantaj la krudan kotonon, la vatigitan kotonon tre rapide aperiganta ĉe la antaŭo, kaj aŭtomate sterniĝanta sur la tabulo tie. Ĉang la Pliaga ŝiris grandan pecon el la vatigita koton kaj ĝin montris al Majstro Sung, kiu ekvidis ke la prilaborita koton estas tre bona. Li ja ne pensis ke la maŝino povas fari pli bone ol li mem. Vidante ke Majstro Sung fikse rigardis al la vatigita koton, Ĉang la Pliaga rimarkis: "Paŭ-paŭ ankoraŭ estas novulo; spertulo vatigus pli rapide kaj pli bone."

Tiam la apudstaranto diris: "Majstro Sung, lernu funkciigi la maŝinon post resaniĝo!" aŭ "Nia Majstro Sung estas spertulo, se li uzos la maŝinon li certe faros pli bone!"

"Ne tiel certe, ne tiel certe!" diris Majstro Sung.

Reveninte hejmen, Majstro Sung diris al Siaŭ-oh: "Hm, la maŝino efektive funkcias rapide!"

Siaŭ-oh vidinte ke ŝia patro jam ne plu obstinas, kaj diris: "Paĉjo, lernu funkciigi la maŝinon, kaj Paŭ-paŭ vin instruu!"

Post longa silento Majstro Sung abrupte diris: "Kiel ajn, mi ne povas lerni metion de mia propra lernanto!"

Perceptinte, ke ŝia patro jam fariĝis pli cedema kvankam li ankoraŭ hontas lerni de sia lernanto, Siaŭ-oh respondis: "Paĉjo, mi ne aprobas al via diro. Antaŭe, kiam oni ekdisvastigis kotonkulturon, eĉ la distriktestro lernis de vi!"

Ne povante kontraŭdiri Majstro Sung ŝanĝis la parolon: "Zorgu pri via propra afero, pri ĉi tio vi ne enmiksigu!"

Majstro Sung, tamen estis optimisma homo, kvankam li afliktiĝis kaj ŝajnis malsanon dum kelkaj tagoj pro la forkuro de la klientoj al la kooperativo, li fine retransviliĝis post la forpaso de la forta emocio kaj la sento de malŝato iom post iom forvaporiĝis. Kaj li ne plu tiel rigore limigis la liberon de Siaŭ-oh. Dum sia libertempo, Siaŭ-oh trovis okazon kelkfoje iri al la najbara kooperativo, kaj ripetis la vortojn de sia patro al Ĉang Paŭ-paŭ. Fine ŝi diris: "Ŝajnas al mi, li ne malŝatas lerni, sed nur ne povas fardoni la fierencon de majstro."

Paŭ-paŭ ridis kaj diris: "Mi ankaŭ scias pri lia temperamento. Ni tiel faru!" Tiel dirinte, li flustris ion ĉe la orelo de Siaŭ-oh kaj ili ambaŭ ridis.



Prezidanto Maŭ Interparolas kun Gekampanoj Ku Juan

Post aliaj du tagoj, Ĉang la Pliaga ankoraŭfoje vizitis Majstron Sung. Li diris, ke la ĉambro de la kooperativo estas ne sufiĉe granda, ke kun du maŝinoj, la kotonmaŝino kaj la desemiĝa maŝino, en la sama loko, estas ne facile labori, kaj ke oni volas translokigi la kotonmaŝinon al la orienta ĉambro de la domo de Majstro Sung.

Majstro Sung promesis, kaj en la sama tago, la maŝino estis dispartigita kaj alportita. Cio estis metita en la korto. Ĉang Paŭ-paŭ komencis la muntadon kaj ambaŭ Siaŭ-oh kaj Majstro Sung venis al la korto por rigardi.

Siaŭ-oh intence faris multajn demandojn al Ĉang Paŭ-paŭ: "Kian uzon havas ĉi tiu denta rado? Kio estas la funkcio de tiu mekanismo?... Preskaŭ ĉiu ero de la maŝino estis pridemandita. Kaj Ĉang Paŭ-paŭ ankaŭ intence detale klarigis, kvazaŭ alparolante al Siaŭ-oh, sed fakte informante Majstron Sung. La lasta divenis ilian intencion, sed ŝajnis nenion diveni. Li kaŭris apude, fumante, sed liaj okuloj ja fikse rigardis al la maŝinpartoj montritaj de ili, kaj silente memoris pri ĉio. Tiun tagon, Majstro Sung fariĝis pli bonhumora ol antaŭe. Post la kunmeto de la partoj, la maŝino estis portita en la orientan ĉambro, kaj Ĉang Paŭ-paŭ komencis labori sur ĝi. Majstro Sung staris ĉe la pordo rigardante por kelkaj momentoj. Ĉang Paŭ-paŭ diris: "Majstro Sung, vi ĝin provu, ĉu bone?"

"Mi ne tion lernas!" respondis Majstro Sung. Sed li ja tre deziris sidi sur la maŝino kaj provi. Tamen li vere ne volis lerni la metion de sia lernanto.

Tiun vesperon, je la tempo de lamplumigo, Ĉang Paŭ-paŭ ĉesis labori kaj ekiris hejmen. Antaŭ la foriro, li renkontis Siaŭ-oh ĉe la korto. En la mallumo li tenis ŝin je la mano kaj diris: "Siaŭ-oh, ĉu vi pensas ke via patro komprenas nian prezentadon hodiaŭ antaŭtagmeze?"

"Verŝajne li ne atente aŭskultis," diris Siaŭ-oh.

"Persvadi vian patron lerni manipuli la kotonmaŝinon estas tasko metita sur ni ambaŭ de la direktoro de la kooperativo. Ankaŭ vi havas respondecon se ne sukcesos. Do ni..."

"Foriru vi!" Siaŭ-oh lin ekpuŝis.

Post la forlaso de Paŭ-paŭ, Siaŭ-oh fermis la kortan pordon kaj reiris en sian domon. Ŝi vidis sian patron kaŭranta sur la briklito fumante, kvazaŭ meditante pri io. Siaŭ-oh intence parolis kun li pri la kotonmaŝino, sed Majstro Sung ne respondis. Iom poste, li kovris sin per la litkovrilo kaj endormiĝis. Ankaŭ Siaŭ-oh povis fari nenion krom estingi la lampon kaj enlitiĝi.

Meznokte, Siaŭ-oh estis vekita de regula sono de "ĉi-ĉa, ĉi-ĉa." Ekkomprene, ŝi palpserĉis al la loko kie ŝia patro dormis. Neniu sintrovis. Ŝi tuj lumigis la lampon kaj trovis ke ŝia patro estis for. Ŝi sinvestis, ŝtele eliris al la korto, de kie ŝi vidis ke lampo brilas en la orienta ĉambro. Ŝi senspire alproksimiĝis al la fenestro kaj ŝtele trarigardis: Estas ŝia patro sidanta sur la kotonmaŝino laborante. Li diris al si mem: "Al la diablo, ja multe pli rapide ol la kotonarko!"

Trad. Censinio



LA USONA POPOLO NE TROMPITA

Estimata Sinjoro,

Antaŭ du tagoj mi ricevis vian tre ŝatindan bulteno—la antaŭan mi ne ricevis—kaj legis ĝin streĉinterese.

.....
Mi certigu al vi, ke tute ne ĉiuj usonanoj harmonias kun la sinteno de nia registaro kontraŭ la popola Ĉinio. Kompreneble la granda plimulto ricevas senhezite la ĉiarimede ĉi tie divestigatajn trompajn, sekve ne povas pripensi ian eksterlandan aferon. Sed tio estas ankaŭ grandparte nura ŝajnaĵo. La Usona popolo, ege timigita de la registaro, kaj pro tio senvoĉa, ne estas tute trompita. Troviĝas ankaŭ multe pli da usonanoj ol oni supozus, kiuj ne fidis la nunan registaron kaj ne aprobas ĝian eksterlandan programon.

.....
SUB la zorgo de la Popola Registaro, la loĝantaro en Nordokcidenta Ĉinio, kiu suferadis de frosto, malsato, malsanoj kaj analfabeteco sub la reakcia regado de Kuomintango, nun ne nur jam havas sufiĉe por manĝi kaj vesti, sed ankaŭ ekhavas grandan nombron da lernejoj kaj bone ekipitajn higienajn centrojn por zorgi pri ilia sano. Laŭ nekompleta statistiko nun sin trovas jam pli ol 26,000 elementaj lernejoj en tiu regiono, en kiuj lernas pli ol 1,740,000 geknaboj (36 procentojn pli multe ol en lasta jaro). Pli ol 400 lernejoj fondiĝis speciale por la laboristoj, kaj la nombro de laboristo-lernejoj nun estas kvinoble pli granda ol en la pasinta jaro. Por kontentigi la ĉiam kreskantan legantaron, la nombro de libroj, periodaĵoj kaj aliaj eldonaĵoj produktitaj en Nordokcidenta Ĉinio en la unua duono de tiu ĉi jaro estas 81-procentojn super tiu de la dua duono de la lasta jaro. Nombro da libroj estas tradukitaj en la lingvojn de minoritatoj kaj eldonitaj en konsiderinde granda nombro. La higiena laboro rapide prosperiĝas en tiu regiono kaj nun en ĉiu gubernio de Senci-, Kansu- kaj Ningŝia-Provincoj jam sin trovas higiena centro same kiel en la plejparto de la gubernioj de Sinkiang- kaj Ĉinghaj-Provincoj. Multaj vilaĝoj jam havas specialajn organizojn zorgantajn pri higiena laboro. Rimarkindan sukceson oni atingis ankaŭ en trejnad de akuŝistinoj kaj fonda de infanvartejoj por laborantaj virinoj.

.....
D LI ol 72,800 popolanoj en Kalikuto, Hindio vizitis la Ĉinan Kulturajn Notojn kiu fermiĝis je la 4a de la kuranta monato post kvintaga ekspoziciado. En la ekspozicio montriĝis fotoj pri nova Ĉinio, kopioj de rigardindaj mur-pentraĵoj en la kavoj de Tunhuang (敦煌), antikvaj artaĵoj kaj modernaj manfaritaĵoj, kiuj tre interesis la rigardanton. La vizitantoj estis tiel multaj kaj svarmantaj,

precipe pri Ĉinio kaj Koreio! Male, ekzistas tra nia lando, inter tiuj, kiuj ankoraŭ amas nian propran historion kaj elfaritaĵojn, preskaŭ neniuj kiu ne ĝojegas pro ĉiu movado tra la mondo, per kiu la popoloj vidigas, ke ili celas akiri por si liberecon, memregadon kaj bonan vivon.

Precipe memorante la malĝojigan historion de la ĉina popolo sub la premado de la en- kaj eksterlandaj banditoj ĉiaspecaj (ĉu militaj, ĉu ekonomiaj, ĉu nur sinservaj), multaj inter ni sentas ĉe la venkaktiro de libereco en Ĉinio nian propran kvazaŭliberigon. Por ni ĝi signifas, ke la nova renaskiĝo de la demokratismo, tiel ege bezonata ĉi tie, komenciĝas ne inter ni mem, sed inter vi kaj aliaj subpremitaj popoloj en Asio, Afriko, partoj de Eŭropo. El via kuraĝo ni povos lerni. Venos ankaŭ ĉi tie, oni esperas, forigo de la monstra sinservemo nomata la kapitalismo. Tiam ne plu ekzistos ĉilande la nunaj frenezaj baroj kontraŭ frateco inter la tuta homaro.

Sincere la via

J. F. C. Usono

ke oni devis plimulti la vizitajn horojn, kaj malgraŭ tio la vizitantoj devis atendadi en vico kilometron longa antaŭ ol enpaŝi la ekspoziciejon. En la opinolibro la vizitantoj skribis interalie: "Ne esprimebla estas mia ĝojo", "Baroj sin trovis inter niaj du landoj, sed nun, tra la ekspozicio ni povas vidi la realan novan Ĉinion." Pro manko de tempo, la ekspozicio ne montriĝis en Madraso kiel planite, sed rekte transportiĝis en Birmon.

.....
ĈINA-RUMANA Kultura Kontrakto estis subskribita je la 12a de decembro de ŝen Jen-ping (沈雁冰), Ministro de Kulturaj Aferoj de la Centra Popola Registaro de la Popola Respubliko de Ĉinio kaj N. Popescu Doreanu, Ministro de la Publika Edukado de la Popola Respubliko de Rumanio. La kontrakto celas plifortigi la amikan rilaton kaj pliiigi interkom-

prenon inter la ĉina kaj rumana popoloj kaj firmigi kaj disvolvi kunlaboradon por la defendo de mondpaĉo. Ĝi postulas interŝanĝon de konstruaj spertoj en la kampo de kulturo, edukado, scienco kaj arto inter la du landoj kaj pliiintensigon de la kunlaboro inter kulturaj, edukaj kaj sciantaj institutoj de la du landoj.

.....
PROFESORO Ting Ĉen-lin (丁振麟) kaj Lektoro Vang Liĉĵuan (汪麗泉) de la Agrikultura Fakultato de Ĉekiang-Universitato sukcesis en eksperimentoj pri elkulturo de branĉdona hordeo kaj pli-produkta batato. Profesoro Ting Ĉen-lin estas komitatano de la Hangĉou-a Filio de la Ĉina Miĉurin-Instituto, kaj li jam delonge studadas pri la teorio de Miĉurin. En tiu ĉi jaro li greftis ses batat-plantojn per lun-floro (samfamilia kreskaĵo de batato) helpate de Lektoro Vang Liĉĵuan, kaj ili sukcesis. Dank' al la riĉa foliaro de lunfloro, la greftita batato povas akiri pli da nutraĵoj kaj doni pli da rikono. La ses greftitaj batatoj produktis sume 104 ĝinojn



Grava Informo

Dank' al la subteno kaj kunlaboro de la tutmondaj pacamaj kaj progresemaj esperantistoj nun ni jam havas la eblecon kontentigi la legantaron per pliampleksigo de nia bulteno. En la venonta jaro ni aperigos EPC-on en pliampleksaj kajeroj (24 p. 19cm. X 26cm.) kun pli riĉa enhavo, nealtigante la abonkotizon. (La perantoj bonvolu rekompenci per nia bulteno la abonantojn kiuj pagis pli ol la nove decidita abonkotizo). Esperantan Kalendaron de 1952 kun plurkolora bildo ni donacos al ĉiu, kiu abonas nian bultenon por la venonta jaro antaŭ la fino de februaro, 1952.

PAGU AL NIAJ PERANTOJ

- Aŭstralio:** Steve Bennett, Flat 3, 62 Brighton Av., Croydon Park, N. S. W. (Jarabono 7s. 6p.)
- Aŭstrio:** Antonio Balague, St.-Pölten, Kirchenweg 12. (Jarabono 20 schilling-oj)
- Belgio:** Walraevens Rajmundo, Rabelais Strato, 10, Bruselo. (Poŝtekkonto: 16, 43, 53) (Jarabono: 50 bfr.)
- Britlando:** (1) F-ino F. Paraige, 10 Woronzow Road, St. John's Wood, London, N. W. 3. (Jarabono 6 ang. ŝil.)
(2) Universala Esperanto-Asocio, Herongate, Rickmansworth, (Herts.).
(3) Collet's Subscription Department, 40 Great Russell Street, London, W. C. 1.
- Bulgario:** (1) Bulgara Esperantista Kooperativo, Sofia—Str. TRI UŜI, 15. (Jarabono 200 Lv.)
(2) Ivan Kovaĉev, Sofia, str. "Iv. Bigor" no. 24.
- Ĉeĥoslovakio:** (1) Burda Rudolf, Plzen, palackeho N. ĉ. 6. (Jarabono 50 kĉs.)
(2) Slovaka Esperanto-Instituto, T. S. Martin, Kuzmany-str. 29. ĈSR-Slovakio.
- Danlando:** Borge Astrup, Ymersvej, 32, Randers. (Jarabono 6 kronoj)
- Finnlando:** Niilo Kavenius, Niklaksenkatu 10/14, Turku 9. (Jarabono: 300 Fmk.)
- Francio:** Labor-Esperantista Federacio, 34, Str. Chabrol—PARIS—Xe. (CCP. Paris 902-52) (Jarabono: Fr. Fr. 450)
- Germanio:** Arthur Schulze, Berlin-Lübars, Kolonie, Waldesrieden 77. (poŝteĉk-n 105666) (Jarabono: 6 D.M.)
- Hungario:** (1) KULTURA, Budapeŝt, V. Akademia u. 10. (Jarabono 15 forintoj)
(2) Marton Lajos, Bors-u. 2, Budapeŝt, XII. (poŝtkonto 38.137)
- Islando:** Signildur Gudmundsson, Falkagata 1, Reykjavik. (Jarabono 15 kronoj)
- Italio:** Casella postale 225 - TORINO (Jarabono: 400 liroj)
- Izraelio:** Bencion H. Danon, Kibuc Afikim. (Jarabono: 400 prutoj)
- Japanio:** (jarabono 360 jen-oj)
- Nederlando:** (1) Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen. (Jarabono fl. 3.50)
(2) Esperanto-Grupo Vaals, Pr. Bernhard-str. 4, Vaals.
- Pollando:** Isaj Dratwer,—Asocio de Esperantistoj en Pollando, Warszawa Marszalkowska 81/32. (Poŝteka konto P.K.O. I 8266/115) (Jarabono 12 zl.)
- Rumanio:** Rumana Esperantista Societo, Bucureŝti I, Bulev. 6 Martie 15, et. I. (Jarabono: 120 leoj)
- Svedio:** Einar Adamson, Värmlandsgatan 18, Göteborg. (Jarabono 5 kronoj)
- Usono:** (jarabono \$1.25)

Rim: Legantoj en aliaj landoj povas pagi per respond-kuponoj (1 rk. kontraŭ 1 ekz.) aŭ egalvaloraj Esp-aj libroj (sed ne gazetoj). Senpagan specimenon ni sendos al ĉiu kiu letere postulos.

da batato, kaj unu el tiuj plantaĵoj produktis eĉ 31 ĝinojn. La branĉdona nova hordeo estas elkulturita per transplantado de la junplantaĵoj de hordeo. 20 procentoj de la transplantitaj junaj hordeoj donis 2 ĝis 8 branĉojn. Ĉiu el tiuj plantaĵoj povas produkti meznombro 50 grajnoj kaj iuj el ili eĉ produktis 72. La branĉdona hordeo produktas 50 procentojn pli multe ol la ordinara hordeo.